## S☆E☆L

Fondinto: "Avoto"
Kunfondinto: J.W. Leslie

Honoraj Prezidantoj:
"Avoto". Norman Booth.
Kolonelo D. H. Davis.
L. J. VanGulck.

Prezidanto:

Sekretario: J. K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando.

Kasisto: David H. Withey, 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22, Britujo.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach Nergt 37 c, N-6500 Kristiansund N, Norvegujo.


Denove mi devas danki por la multaj salutoj kaj leteroj kaj sendaĵoj, kiujn mi ricevis dum la kristnasko kaj je jarŝanĝo. Tre multaj leteroj esprimas kontenton pri la nuna aspekto de nia gazeto Sed ankaŭ, feliĉe, alvenas kritikaj leteroj.

Temas i.a. pri la nova dorso. Kial vi, diras iu, presigas ĝin tia, kaj mem metas en koverton? Nu - la presejo ekspedas ĝin per alsenditaj alglueblaj adresoslipoj, kelkaj ope, aliaj amase. Ili verŝajne trovas ekspedon per sama metodo al ĉiu pli facila.

Alia eldiro estas pli grava.

La poŝto en kelkaj landoj malpermesas senkovrilaj sendaĵoj ĉar alia poŝto povas engliti inter la folioj de La Skolta Mondo kaj tiel malaperi.

Mi tial insiste petas, ke niaj Naciaj Reprezentantoj respondu al jena demando:

Ĉu la "reformo" estis utila aŭ ĉu vi ne povas utiligi ĝin?

Respondu per poŝtkarto al mia adreso (kaj se vi volas fari al mi komplezon, afranku per bela poŝtmarko), kaj mi decidos laŭ la respondoj. Do: se ne plimulto respondos: Ni uzas ĝin - mi devos lasi ĝin, pro la landoj en kiuj ĝi ne estas laŭ la reguloj.




El Aŭstralio venis donaco al mi, kredeble de SEL-ano, kaj mi tre dankas pro bumerango, kiun mi provos, kiam la neĝo malaperos. Fabrikis la bumerangon iu fabriko por difektituloj, kaj laŭ mia opinio konkursoj per ili povos esti tre trafa por skoltoj. Kial ne subteni la fabrikon?

Ankaŭ redaktoro revas pri io: Se mi nur havus - anstataŭ mia 20-jara skribmaŝino - tute modernan kun elŝanĝeblaj literoj! aŭ pli modeste: se mi havus tondilon kian uzas fotografoj, per kiu mi povus tranĉi tute rektan linion. Kiel nun estas, la redakta kaj tipografa laboroj estas farataj amatore, per primitivaj iloj kaj en limigita libertempo.

Per kio vi do povas helpi? Ĉefe per ordinara SEL-laboro, kaj per alsendo de ideoj, bildoj, interesaj artikoloj, skoltaj revuoj - jes, mi ripetas min mem.

Koran saluton
via redaktoro.

La skoltestro unue faru sian ĉiutagan bonan agon!

(W.P.60)



Kovrila foto:
El "Procenta kalendaro"
de Norges Kristelig Ungdomsforb.





# FREDERICK DOUGLAS MURPHY

Kiel ĉiu skolto scias, ni per la supra signo diras, ke Douglas Murphy hejmen iris.

Nia prezidanto estis kristano, 16 jara li estis baptita plenkorpe laŭ la ritoj de la Baptista eklezio, kies fidela ano li restis ĝis sia morto. En la eklezio li instruis en Dimanĉa Lernejo, kaj dum multaj jaroj li estis Presbitero de sia eklezio. Ni konas lin kiel fidela kristano, kaj ni fidas, ke li vere iris hejmen.

Li naskiĝis la 4-an de Majo 1905, edziĝis 1929, kaj la paro ricevis filon 1935. Profesie li estis bankoficisto, sed emeritiĝis 60-jara en 1965.

En 1918 li skoltiĝis, kaj ankaŭ en la skolta movado montriĝis la fideleco, kiu estis tiel grava parto de lia personeco. Tial li trapasis la ŝtupojn: Patrolestro - Subtrupestro - Grupestro - Distrikta Helpkomisaro - Distrikta Sekretario - Distrikta Gazetara Korespondanto ĝis li fariĝis kaj restis Provinca Helpkomisaro kaj Provinca Gazetara Korespondanto. Kompreneble li portis la "Lignan Insignon" de Gilwell, krome la ĉefskolto honoris lian laboron per la "Arĝenta Glano" kaj poste per la "Arĝenta Lupo", la plej alta honoro de skoltismo. Je sia morto li estis Prezidanto de la Felixstowe-aj Marskoltoj.

Jam en 1919 li esperantiĝis, kaj sciis kunligi la du idealismaj movadoj, kiam li fariĝis ano n-ro 58 de S.E.L. en 1919. Ankaŭ lia esperantista kariero estas okulfrapa. Li estis redaktoro de la iama "Skolta Bulteno", poste vicprezidanto kaj fine prezidanto de S.E.L.

Ankaŭ aliaj flankoj de la movado profitis el lia laboremo: Li ricevis Diplomon de la Brita Esperantista Asocio kaj nomiĝis Fratulo kaj Speciala Ekzamenisto. Dum multaj jaroj li estis delegito de UEA kaj fakdelegito por Skoltismo, Bankaferoj kaj Kristanismo. Li ankaŭ restis Konsilanto de BEA kaj membro de ties Estraro kaj Prezidanto de Komitatoj Socia kaj Turisma. Li siatempe estis Sekretario de Orienta Esperanto-Federacio, poste eĉ Prezidanto.

Li fondis Esperanto-grupon en Ipswich, kaj dum multaj jaroj li estis ties Sekretario aŭ Prezidanto.

En 1955 li aliĝis al KELI, kaj fariĝis kaj restis Sekretario de la Brita Sekcio, kaj Estrarano de KELI dum pluraj jaroj.

Evidente do estas, ke ne nur ni funebras pro lia forpaso. Liaj laborfortoj kaj kapabloj igis lin ŝatata kaj honorata inter tiuj, kiuj konis lin persone, kiel ĉe tiuj, kiuj nur letere kontaktis kun li.

Dum kvin jaroj li estis nia tre lerta Prezidanto, kaj ni malĝojis kiam ni aŭtune aŭdis pri lia malsano. Nun ni funebras kune kun liaj edzino kaj filo.

